

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Posteekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Hurler, Max Buttin.
Literatura red.: Zanoni.

Kunlaborantoj inter la Esperantistaro de la tuta mondo.

Semajna

Kun senpaga monata „Revo“

Neŭtrala

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon kaj ni liveros ET ĝis elĉerigo de la sumo. Pri finiĝanta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. Germanoj abonu ĉe sia poŝtoŭficejo.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 800 Kr.	Ĉeĥosl. 1.20 Kr.	Hungara 30 Kr.	Litova 20 Cd.	Rumana 3 Leol.
Belga 0.60 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lit.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Gmk.
Brita 3/4 Pc.	Francna 0.50 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levol	Germana 1.20 Mk.	Jugosl. 1.50 Din.	Pola 150 Mk.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.50 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj latvoj demandu la prezon ĉe sia Abonejo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4. Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.

Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj.

Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 60 gmk.); rebato laŭ interkonsento.

ARBU POR!
Nürnberg per nia
V NÜRNBERG
numero

Numero 115 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 17. Decembro 1922.

Bialystok, la nask-urbo de D-ro Zamenhof.

Okaze de la datreveno de la naskiĝotago de la Maistro ni prezentas al nia legantaro priskribon de lia naskiĝurbo. — Bialystok (elp. Bjaŭistok) kuŝas je 53.08° de norda latitudo kaj 23.09° de okcidenta longitudo laŭ Grinviĉ, 134 metrojn alte super la maro. Ĝi estas grava fervoja punkto, ĉar ĝin trairas diversaj fervojaj linioj: al Varsovio, Grodno, Vilno, Baranoviĉe, Grajevo. Ĝia nomo signifas „la defluo de la Blanka (Biała)“ (**). Tiu „Biała“ estas malgranda rivereto, trafluanta la mezon de la urbo. La vizitantojn de Bialystok ĉiam mirigas, ke la „Blanka“ en efektiveco estas tre „malblanka“, malpura rivereto. Malnova legendo rakontas tamen, ke iam „Biała“ estis ankaŭ blanka kaj larĝa rivero, sed ĉar en ĝi dronis la tiama bialystoka princo, tial la princedzino malbenis la Biała'n, ekkriante: „Ho rivero Blanka, vi nigriĝu, via elfluo mallarĝiĝu kiel fingro!“ De tiu tempo laŭ la diroj de la legendo, la rivero nigriĝis kaj mallarĝiĝis, kaj tia ĝi aspektas ankaŭ nun.

Bialystok estis fondita kiel vilaĝo en la jaro 1320 de la fama fondinto de Vilno, la litova princo Gedimin (regis 1316—1341). En Februaro de la jaro 1386 la litova princo Jagello edziĝis kun la heredantino de la pola trono, Jadviga, kaj akceptinte tial ankaŭ la titolon de „pola reĝo“, kunigis Litovujon kun Polujo. Sed la vilaĝon Bialystok kaj aliajn lokojn li ankoraŭ en la jaro 1384 donacis al sia ribelanta kuzo Vitold (alie nomata Vitovt), kiun li poste en la jaro 1392 nomis „grand-princo de Litovujo“.

En la jaro 1401 okazis la kunigo de Litovujo kun Polujo, kaj en la jaro 1569 la kunigo de tuta Litovujo, Prusujo kaj Latvujo kun Polujo, sekve de kio ankaŭ Bialystok ekapartenis al Polujo. La lasta reĝo el la idoj de Jagello, Jan Kazimir (1648—1669) donacis en la jaro 1661 la vilaĝon Bialystok kune kun la aliaj ĉirkaŭaj vilaĝoj al la pola duko Stefano Czarnecki (Czarnecki naskiĝis 1599, mortis 1665), post kies morto ĝin ricevis lia nepo Klemens Branicki. Branicki enloĝigis en Bialystok, konstruigis en la jaro 1703 belegan palacon, ekzistantan ĝis nun kaj faris el Bialystok urbon. En 1749, dum la regado de la reĝo Augusto III., ĝi estis oficiale nomita urbo. En la jaro 1771 Branicki mortis kaj la urbon laŭ lia testamento ricevis duko Joahimo Potocki, kaj post ties morto la dukoj Felikso kaj Johano Potocki. Dum la tria divido de Polujo en 1795 Bialystok estis enkorpiĝinta en Prusujon, kies reĝo Frideriko Vilhelmo aĉetis ĝin ĉe la dukoj Potocki por 207 970 taleroj. De 1795 ĝis 1807 Bialystok

*) En la historiaj dokumentoj de XV-a jarcento Bialystok estas nomata „Bielščany Stok.“

restadis sub prusa administrado kaj formis provincon „Nova-Orientprusujo“ („Neu-Ost-Preussen“). En la jaro 1807 laŭ la „Tilzita paco“, okazinta en Tilzito (Tilsit) inter Napoleono, Frideriko Vilhelmo kaj la rusa imperiestro Aleksandro I. labialystoka regiono estis aligita al Rusujo. En 1812 Bialystok estis nelongan tempon okupata de la franca armeo de Napoleono la Granda. En Bialystok oni formistiam „Provizoran Registaron de Grand-

duklando Litova“. Sed jam la 14. de dec. 1812 la franca armeo forlasis la urbon kaj ĝin reokupis la rusoj. La Viena Kongreso de 1815 konfirmis la aligon de Bialystok al Rusujo. De tiu tempo Bialystok formis parton de la „Nord-Okcidenta Regiono“, t. e. Litovujo en la limoj de la Rusa Imperio. Post la komenco de la eŭropa milito ĝin la 26. de aŭgusto 1915 okupis la germanoj, administris ĝin kaj faris el ĝi en la jaro 1917 administran centron de la „militista administrado de Suda Litovujo“ („Militär-Verwaltung Litauen-Süd“) kaj restis en ĝi ĝis la 19. de februaro 1919. La 19. de februaro 1919 laŭ interkonsento inter la germana okupacia armeo kaj la pola generala stabo la urbon okupis la pola armeo. La 8. de decembro 1919 la „Plej supera Konsilantaro“ difinis la provizoran okcidentan limon de Polujo, laŭ kiu Bialystok estis apartenanta al Polujo. La 28. de julio 1920 dum la pol-rusa milito ĝi estis okupita de la rusa ruĝa armeo kaj la 30. de julio proklamita kiel „provizora ĉefurbo de Ruĝa Polujo“. Tamen jam la 22. de aŭgusto de la sama jaro la pola armeo reokupis la urbon kaj la packontrakto inter Polujo kaj Rusujo farita en Riga en 1921 ree konfirmis la apartenecon de Bialystok al Polujo.

La urbo mem havas relative malmulte da eksteraj rememoroj pri la historia kresko de la urbo. Al tiuj malmultaj historiaj apartenas antaŭ ĉio la supre jam menciita „palaco de Branicki“, kiu konsistas el tri konstruaĵoj, ĉirkaŭitaj de grandega parko. Antaŭe la parko de la palaco estis kunigita ankaŭ kun la nuna „urba arbaro“, kie tiam estis menaĝerio. Eĉ nun tiu arbaro estas nomata „zwierzyniec“ („menaĝerio“). Depost 1841 ĉiuj artobjektoj el la palaco estis forveturigitaj Petersburgon kaj en la palaco mem estis aranĝita „Instituto de Nikolao I por nobelaj fraŭlinoj“ t. e. ferma edukejo-lernejo por filinoj de rusaj nobeloj. Dum la germana okupacio 1915—1919 la palacon okupis antaŭe la germana stabo („Ober-Ost“) kaj poste la germana milita administrado de Suda Litovujo. Nun tiun palacon okupas la administrado de Bialystok'a „vojevoda regiono“ (t. e. gubernio).

El aliaj historiaj konstruaĵoj estas notinda la domo je la strato Kilinskiego (antaŭe Germana) n-o 16. Ĝi estas konstruita de itala arkitekturo kaj estis dum la vivo de Branicki verŝajne teatro. En la supra etaĝo de tiu domo estas ankoraŭ nun granda salono kun restoj de galerio. Aliaj famoj diras, ke tie iam estis masona loĝio. Krom tio, tiu domo estas interesa ankaŭ pro tio, ke Napoleono dum sia remaŝo el Moskvo estinte en Bialystok tranoktis en ĝi.

Interesa estas ankaŭ la malgranda katolika preĝejo je la sama strato, lignkonstruita jam en 1576 kaj rekonstruita en 1746 de Branicki. Kon-

traŭ tiu ĉi preĝejo staras la t. n. „malnova hotelo“ (antaŭe „germana hotelo“), kiu ĝis la jaro 1833 estis virina monaĥejo, pri kio atestas la pendon a ĝis nun murtabelo kun latina surskribo.



Ĝenerala vidaĵo de Bialystok.

la balkono de la turo fajrobrigadisto atente observadis la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn kaj rimarkinte fumon (tial signalis al la fajrobrigado). Eĉ nuntempe malgraŭ la ekzistado de telefonoj la turo bonege servas por tiu celo.

El aliaj konstruaĵoj ni notu ankoraŭ la „realan lernejon“ (nun pola virgimnazio), kiu estas konstruita en 1804 dum la prusa administrado en Bialystok laŭ la ordono de la reĝo Frideriko Vilhelmo III kaj kiu interesas nin, Esperantistojn, pro tio, ke ĝi estas la „alma mater“ de nia neforgesebla Majstro.

La Esperantistoj interesas kompreneble precipe la strato kaj la domo, en kiu naskiĝis D-ro Zamenhof. Ni sukcesis antaŭ 3 jaroj konstati, ke li naskiĝis je la „verda strato“. Laŭ la peto de grupo de ĉi tie samideanoj, kiu estis subtenita de kelkaj kultursocietoj, la Urba Komitato de Bialystok en sia kunsido de 11. de junio 1919 decidis por honorigi sian eminentan samurbanon alinomigi ĉi tiun straton „Zamenhova strato“. Tiu ĉi strato kuŝas en la centro de la urbo kaj deiras de la ĉefa strato Lipowa.

La domo, en kiu nia Maistro naskiĝis, troviĝas je angulo de la Zamenhova kaj Brudna („malpura“) stratoj. Tio estas malnova ligna domo kun sufiĉe interesa arkitekturo. Ligna kovrita ŝtuparo kondukas al la supra etaĝo en la loĝejon, kie naskiĝis la Maistro. La loĝejo mem estas tre mizera kaj malgranda. Ĝi konsistas el tri etaj ĉambroj. La domo mem restis ĝis nun en la sama stato, en kiu ĝi estis, kiam naskiĝis la Maistro.


La intenco de Bialystokoj samideanoj alnavigi al tiu domo marmoran memortabulon bedaŭrinde ne povis pro diversaj kaŭzoj ĝis nun esti efektiva. Krom donacoj de bialystokaj Esperantistoj ni ricevis por tiu celo dum la Praha Universala Kongreso tute nepetite de s-o prof. Roy tre atendantan monofonon. Nun esperinde post nelonga tempo nia intenco estos efektiva.

Antaŭ la milito Bialystok havis ĉirkaŭ 100 000 loĝantojn, nun nur 72 000. Ĝia loĝantaro konsistas, kiel oni jam scias el la „Letero pri deveno de Esperanto“ el diversaj nacioj: poloj, blankrusoj,

rusoj, hebreoj, germanoj. El ili estas 70% da hebreoj, 20% da poloj, la reston faras la dirtitaj aliaj nacioj.

Bialystok estis antaŭ la milito grava industria centro, liveranta siajn ellaborojn precipe en Rusujon kaj konkuranta eĉ kun la germanaj, francaj kaj anglaj ellaboroj. La ĉefaj objektoj de la bialystoka industrio estis: diversaj drapoj, litkovriloj, ledoj. Krom tio estis fabrikataj maŝinoj, cigaredoj, ĉapeloj, sapoj, butonoj ktp. Laŭ la oficiala rusa statistiko de la jaro 1895 en Bialystok estis 230 drapfabrikoj kun 5000 laboristoj, produktantaj drapojn je 3 1/2 milionoj da rubloj jare. Da ledaj fabrikoj estis en Bialystok en la jaro 1913 50 kun 1000 laboristoj; krom tio funkciis 3 maŝinfabrikoj, 3 cigaredfabrikoj, 2 ĉapel-fabrikoj, 3 vafabrikoj ktp. La fabrikoj en Bialystok produktis en 1912 ĉirkaŭ 25 milionojn da brikoj.

Nun post la milito bialystoka industrio jam revivigis, kvankam ĝi kompreneble trovas multajn malhelpojn kaŭze de la ĝenerala ekonomia situacio kaj pro la perdo de siaj antaŭmilitaj vendolokoj (Rusujo). Laŭ la nova oficiala statistiko en la jaro 1921 en Bialystok funkciis 248 drapfabrikoj, 25 ledofabrikoj, 4 vafabrikoj, 2 cigaredfabrikoj, 4 maŝinfabrikoj, 3 bierfarejoj, 2 brosfabrikoj, 55 muelejoj ktp. Entute estis en la bialystoka industrio en tiu jaro okupitaj 9334 laboristoj, el kiuj 7110 en pli grandaj fabrikoj kaj 2224 en la pli malgrandaj. La pli grandaj fabrikoj estas komplete kaj moderne aranĝitaj: ekz. la cigaredfabriko „F. D. Janovski“ posedas propran kestofarejon, presejon, litografejon ktp. Ĝi produktas ĉiutage 2 milionojn da cigaredoj kaj 2000 kilogramojn da „tranĉita“ tabako. Nun




Zamenhova naskodomo en Bialystok (vidaĵo de la strato).
Sup la domo oni rimarku la stratsildon „Zamenhova“.

ree funkcias en Bialystok preskaŭ ĉiuj fabrikoj, funkciintaj antaŭ la milito.

En Bialystok aperas nun 2 ĉiutagaj kaj 2 ĉiusemajnaj gazetoj: nome ĉiutaga pola „Dziennik Bialostocki“ („Bialystoka ĵurnalo“), 4—6-paĝa, aperanta de 1. de aprilo 1919; ĉiutaga hebrea „Dos nae Lebn“ („La nova vivo“), 4—8-paĝa, aperanta de februaro 1919; pola ĉiusemajna „Nowe Życie“ („La nova vivo“), popola kristan-demokratia organo, 16 paĝa, kaj rusa ĉiusemajna „Swobodnaja Mysl“ („La libera penso“), progresema organo, 4-paĝa. La hebrea „Dos nae Lebn“ kaj la pola „Dziennik Bialostocki“ favore rilatas al Esperanto kaj ofte presigas pri-Esperantajn notojn.

Dum la germana okupacio en Bialystok aperadis nur unu oficiala „Bialystoka gazeto“ en tri lingvoj (germana, pola kaj hebrea). La aperigo de privataj gazetoj estis tiam malpermesita. Ankaŭ en tiu „Bialystoka gazeto“ aperis kelkaj notoj pri Esperanto kaj ĝia aŭtoro.

En Bialystok funkcias urba biblioteko (nur en pola lingvo) kaj kelkaj sociataj bibliotekoj. Ekzistas ankaŭ diversaj societoj profesiaj, kulturklerigaj ktp.



BIALYSTOK, KATHOLISCHE KIRCHE
БѢЛЫСТОКЪ, ПОЛЬСКІЯ КООСТЕЛЪ

Katolika preĝejo en Bialystok.



Zamenhofa strato en Bialystok.

La legantoj verŝajne supozas, ke en la multlingva Bialystok ekzistas almenaŭ kelkdek Esperantistaj societoj. Ili do senfine miros, eksciantes, ke en la naskiĝurbo de la Majstro nur en fino de 1920-a jaro fondiĝis „Zamenhofa Esperantista Societo“, kiu devis batali kun diversaj aliloke tute superflujaj baroj kaj kiu nur en novembro de la jaro 1922-a estis oficiale konfirmita. Tiel Bialystokaj samideanoj, kies nombro feliĉe ĉiam plimultiĝas, praktike spertas la verecon de la malnova proverbo: „Neniu estas profeto en sia patrolando“.

J. Sapiro, E. L. A.,
eksekretario de la urbo Bialystok.

Oni protestas.

En ET n-o 104 ni aperigis la portreton de s-o D-ro R. Fanta kun artikolo pri lia agado. Tiu artikolo ĉerpita el detala raporto de la nomito mem, vekis viglan ĉion ĉe la rumanlanda samideano.

S-o T. M., sekretario de Esp. Grupo en Cluj, skribis al ni interalie: Antaŭ tri jaroj aperis en Transilvanio propagandisto anoncanta instrui Esperanton ĝis la grado de perfekteco dum 6

aŭ 15 horoj laŭ „nova, senpera, internacia, ĉiutande aplikebla, de li mem eltrovita“ instrumentado. Tiu kurso kaŭzis ĉe la publiko fatalan disreŝigon, ĉar la 6-hora kurso signifis 2-tagan kurson kun 2 lecionoj 3-horaj kaj la 15-hora kurso daŭris 3 tagojn kun 3 lecionoj po 5 horoj! La tuta rezulto estis nur la perdo de nekutime altega lernopago kaj ankaŭ la nepra senkreditiĝo de nia movado. Tiu persono, nomanta sin „propagandisto, oratoro, verkisto kaj instruisto“, estas tiom ŝatata, ke unu el liaj lernintoj, aŭdinte, ke li intencas denove fari kurson en ŝia urbo, sendis al la Esp. Oficejo

en Cluj leteron kun jena parto: „Se vi konas Dion, savu nin de la danĝero: Je mia teruro ĵus mi sciigis, ke s-o F. venos ĉi tien por rapidkursi. Ĉiu homo en nia urbo estos formigita de Esperanto pere de li. Faru ĉion eblan por venigi alian s-anon anstataŭ li.“ Nun tiu profesoro, kies lingvan scipovon karakterizas uzado de esprimoj kiel „parolantulo“ kaj „pro tial“, volas sin trudi al la eksterlando. Ni esperu, ke la samideanoj singardos. (Cluj, 26. 10. 1922).

Estas strange, ke s-o F. prenis por si atestantojn, kiuj rapidis protesti kontraŭ la laŭda cito de s-o F. Unu el ili, s-o D-ro M. L. Câmpian, skribis jenon: Estas vere, ke mi partoprenis la kurson de s-o F. en du posttagmezoj, kiam la nomita s-o skribis la gramatikon sur la tabulon kaj la trian tagon jam forlasis nin, lasinte en mia kaj en aliaj kapoj la plej grandan konfuzon. Mi neniam lernis de s-o F., ĉar tio tute ne estis lernado. Mi hontas, ke estas inter ni tiaj homoj, kiuj tute senkreditigas nian movadon. (Targu-Mureș, 16. 10. 1922).

S-o inĝeniero kaj senatano E. Balás skribis jene: Kiuj konas nian lingvon, bonege scias, ke ne estas eble ĝin ellerni dum 3-4 horoj. Impulson por lerni ĝin donis al mi s-o F., sed mi lernis ĝin el libro kaj ne de li. (St.-Gheorghe, 9. 10. 22).

Ni opinias servi nur la veron kaj la interesojn de nia movado, kompletigante la jam presitan portreton per tiu ĉi „alia flanko de la medalo.“

Red. de ET.

Flugfolieto.

Scivolemo estas ĝenerale disvastigita. Ĉiu deziras travivi novaĵojn; sed la malamo kontraŭ novaĵoj estas fenomeno, kiun oni trovas nur en la historio de la elpensaj kaj eltrovaĵoj. En la homa konkurado pri gloro kaj enspezoj al multaj ne plaĉas vidi, ke io estas elpensita aŭ eltrovita de aliaj. Jen la radiko de l' malamo kontraŭ novaĵoj kaj de la malfeliĉo koncerne la sorton de elpensintoj kaj eltrovintoj. Unu sola laborkampo, — oni pensus —, estas esceptata: la lingvo komuna por la homaro, ĉar ĝia ideo devenas el pura malegoismo. Tamen ankaŭ Zamenhof, la plej modesta inter la modestuloj, la malgrandulo kun la granda koro, devis sperti la skizitan malamon kontraŭ novaĵoj. Li fidis al supozita amiko kaj rikoltis perfidon. Ido, Esperantido estas konataj nomoj de tiaj detruemaj enviduloj; multaj aliaj eble atendas en embusko. Sed dankon al Dio: laŭ natura leĝo konserviĝas — en la daŭro de l' tempo — nur la plej bona. Ni ne timu la tempon aŭ ion alian. Ni irankvile iru nian vojon!

Z.

Mallongaj Esp. Scilgoj.

Avertio.

Rilatiĝante al nia artikolo en n-o 111, s-o Kr. sendis al ni diversajn dokumentojn lin pravigantaj. Sed ni deklaris, ke ni rifuzos pluajn artikolojn pri tiu temo. Pro tio, ne volante ĝisfunde esplori la aferon, ĉar ĝi ne koncernas nin, ni petegas s-anojn Kr. kaj K. interkonsenti persone.

Preseraro

en la Nürnberg-numero.

En la artikolo „Nürnbergaj Specialaĵoj“ estiĝis malagrabla preseraro. Anstataŭ „Nürnbergaj funebro“, kio estas tute sensenca, oni legu „Nürnbergaj funelo“.

profundaj lagetoj . . . kaj en ĉiu lageto kuŝis unu — infano. Unu el la infanoj falis de alta roko en la lagon, kiu pro la familia nomo de la infano (Morski-Marulo) ĝis hodiaŭ estas nomata „Morskie Oko“ (Mara Okulo). Kiam nenio plu estis en la ĉirkaŭaĵo krom la lagetoj kaj la dezertaj rokoj, la princino, elplorinte siajn okulojn, ne plu povis plori kaj disfluus en unu lago kaj, ĉar ŝi estis nigre vestita, la tuta akvo nigriĝis kaj ĝis la nuna tempo konservis tiun koloron. — — —

La homoj ankoraŭ nun rakontas, ke tie oni ofte aŭdas ploradon kaj veplendon, ĉar ŝia animo ĝemas petante helpon. Sed kiu aŭdinte kompatas ŝin kaj penas helpi al ŝi, tiu estas supersūtata per la neĝo dense falanta de la rokoj.

Kompilita laŭ pola originalo de Fra-Legnerp.

Bildo el mia lando.

Originale skizita laŭ la realo.

Senpompa estas mia kanto,
Neornamita la versaro. —
Simile je la kampdanto
Elkreskis ĝi en Nov-Pazaro

For de la monda brua svarmo
Mi ofte revis pri la belo
Sur herbo freŝa, dum la varmo
Radie fluis de l' ĉielo.

Aŭ inter montoj neĝkovrita
En la kabano turka eta
Mi longe skribis pri l' ermitaj
Mirsonĝoj, kaj pri silueta
Imago de la forestino
Senfine kara, pri la sorto
De mia juna solfratino
Al kiu proksimiĝis morto.

Aŭ en albana grenkamparo,
Limita de la verdmontetoj,
Mi revis pri la blua maro
Bruanta per la ondojetoj.

El la pacifisma movado.

La 18-an de novembro okazis en Hago publika kunveno, organizita de la „Internacia Societo de Virinoj por la Paco kaj Libereco“, sekcio Hago.

S-ino Wichers atentigis, ke la tutmonda gazetaro en la lastaj tempoj ofte mencias, ke Eŭropo ruiniĝas per la teruraj sekvoj de la milito. Tial ĉies devo estas kunhelpi, por starigi novan pacon. Ŝi aldonis kelkajn ekzemplojn, kiel la virinoj jam silente faris multe turilare. Samele virinoj el 38 landoj kunvenos 7.—9. dec. en Hago por priparoli ĉion, kio povos esti farata en la intereso de la vera paco kaj por malhelpi la teruregajn militojn en la estonta tempo.

S-ino Isbrücker, invitita de la societo, diris, ke antaŭ ĉio estas necese, ke oni komprenu unu la alian, ĉu en internaciaj kongresoj, ĉu en la senperaj rilatoj inter la popoloj. Tial krom spirita unueco, nepre necesa estas lingva unueco; ŝi varme rekomendis la lernadon de Esperanto.

S-o de Klerk klarigis la signifon de la pacmovado por la laboristoj, ĉar unu el la plej gravaj sekvoj de la milito estas la nuntempa senlaboreco. La paclaboro ne estu ekskluzive en la manoj de la diplomataro. Fine Esperantlingve li instigis la ĉeestantojn labori kun la pacifistoj.

S-ino C. Mulder de Graaf asertas, ke la pacifistoj kaj la Esperantistoj nepre bezonas unu la alian. Por atingi la celon, la Esperantistoj bezonas pacon, kaj la pacifistoj bezonas Esperanton, por ke ne povu okazi, ke tiuj, en kies manoj kuŝas la sorto de l' mondo, ne komprenas unu la alian. Kvankam la interpretistoj povas esti honestaj homoj, ne estas permesate, ke de ilia sperteco povas dependi la mondpaco aŭ la milito.

S-o P. C. Brederode alternigis la paroladojn per belaj kantoj en la internacia lingvo. Ĉeestis proksimume 100 personoj.

Sigiŝoro (Rumanlando).

Kurso de D-ro Fanta por 15 p., sekvita de publika ekzameno, post kiu multaj ĉeestintoj enskribiĝis por nova kurso.

La Blindul-Asocio en Erfurt (Germ.)

kalkulanta 80 geblindulojn (inter ili 8 Esperantistojn) petas subtenon per havigo de negocaj kaj komercaj interrilatoj, pruntedono de mono por aĉetado de labormaterialoj kaj per mondonacoj. La blindula Esp. grupo akceptas ankaŭ mendojn je trikajoj ĉiuspecaj farataj de Esp. blindulinoj, speciale artaj trikajoj, ekz. tablotukoj aŭ tuketoj por ornamo. Adresu: s-o Kurt Filss, prezidanto, Erfurt (Germ.), Hirschlacherstr. 22.



La Reala Lernejo nun gimnazio en Bialystok, en kiu lernis nia Majstro. (Fotogr. atable disponigita al ET de la redakcio „Nowy Dziennik Białostocki“.)

Historiaj Dokumentoj.

(Unuafoje publikigataj.)

I.

La naskiĝo de la Majstro.

Traduko.

Libro por enskribo de naskiĝintaj hebreoj en la jaro 1859.*)

Paĝo 24.

Parto I. — Pri naskiĝintoj.

N-o	Kiu faris la cirkumcidon		Dato kaj monato de nask. k. cirkumcido		Kie naskiĝis	Profesio de patro, nomoj de gepatroj	Kiu naskiĝis kaj kiam nomon li ricevis
	virina	vira	Kristana	Hebrea			
—	47	Lejb Kon Volf Suraski	Decembro. 8-10	26-19	En Bialystok	Mordka, filo de Fejwel Zamenov**) Ljba, filino de Solem Sofer	filo Lejzer***)

Rimarkoj:

- *) La libro estas presita kaj notita laŭ la rusa leĝo en 2 lingvoj: rusa kaj antikve-hebrea. Ĝi troviĝas en la arkivejo de Hebrea Komunumo en Bialystok.
- **) En la rusa teksto estas notita „Zamenov“, en la hebrea „Zamenof“. Ĝuste devus esti notite ruse „Zamengof“, ĉar „h“ estas ruse skribata „g“.
- ***) Hebrea nomo de „Lazaro“.

II.

Zamenhofa strato.

Traduko el pola lingvo.

Protokolo N-o 22

de la kunsido de Provizora Urba Komitato de la urbo Bialystok, la 11-an de Junio 1919-a j.

§ 20.

Peto de Esperantistoj kaj adeptoj de D-ro Zamenhof.

La petantoj en sia skribaĵo petas pri nomigo de unu el la stratoj de la urbo „strato de Zamenhof“, kiu naskiĝis ĉi tie.

La Komitato, favorante la peton, decidis nomi la straton Zielona alie Jaikowa „strato de Zamenhof“ (en originalo: „ulica Zamenhofa“).

Morskie Oko*).

Pola tradicio.

En la regiono, kie nun estas montoj kaj rokoj, troviĝis iam abundaj grenkampoj, arbaroj kaj herbejoj. Tie, ĉe la limo de l' pola lando, loĝis pola riĉulo, kiu nomiĝis Morski (Marulo). Lia translima najbaro estis hungaro, juna kaj bela princo. Tiu ĉi enamiĝis je la ĉarme bela filino de Morski kaj deziris edziĝi kun ŝi. Sed la patro juris, ke li donos ŝin nur al samnaciano, kaj ne al viro de alia gento.

La maljuna Morski estis militisto kaj subite devis iri kun sia reĝo en malproksiman landon por militadi. Antaŭe li sendis sian filinon en monaĥinejon, por ke ŝi tie restu ĝis lia reveno, minacante, ke li ŝin malbenos, se ŝi edziĝus kun la hungaro.

Sed tro longe li forestis. La junulino tre enuis kaj dume ankaŭ la juna kaj bela princo penis kun ŝi flirtadi. Li sendadis al ŝi belajn koralojn, rubandojn kaj aliajn trezorojn. Krom tio li ligis maljunajn sorĉistinojn antaŭdiri al ŝi, ke ŝi fariĝos tre riĉa sinjorino kaj posedos argentajn palacojn kaj orajn ĉambrojn. Sorĉinfluita per la maljunaj antaŭdiristinoj, la sopiranta junulino promesis forkuri el la monaĥinejo. — — — Iun vesperon antaŭ la muroj de la monaĥinejo aperis la juna princo vestita kiel monaĥo, krucosignante sin kaj laŭle petante almozon. La monaĥinoj nenion suspektante, enlasis lin. Dume la sorĉistinoj nevidate disjetis ĉie sorĉan herbajon, kiu la monaĥinojn kaj la gardantojn hundojn endormigis. Nun la princo kun la knabino povis facile forkuri. — — Veninte en sian landon, la princo baldaŭ konstruigis por sia bela elzino ĉarman koralan palacon, brilantan pro oro kaj aliaj multekostaj ornamaĵoj.

Nun la princino estis feliĉa, ĉirkaŭata de tiom da riĉaĵoj kaj belaĵoj . . .

Dum longaj jaroj ili feliĉe vivis kune kaj tom post iom havis sep infanojn. La maljuna Morski ne revenis. La homoj rakontis, ke la Tataroj mortigis lin en batalo. Sciiginte tion, la filino sin vestis per funebra robo, prenis la reston de la patro posedado kaj . . . sekrete mokis pri la patra malbeno. — — Sed subite la maljuna Morski revenis en sian helmon kaj demandis en la monaĥinejopriista filino, Oni montris al li la koralan palacon brilantan de malproksime. Dume ankaŭ la princino eksciis pri la subita reveno de l' patro kaj lukse vestite iris renkonte al li por salutita reveninto. Sed li krucosignis sin, kraĉis kaj tle forte piedfrapis la teron, ke la iuta koralo palaco disfalis je polvo. Poste li ekkriis:

„Dio donu, ke via edzo kaj lia tuta posedado iĝu ŝtonoj!“

Kaj kiam la princino alkondukis sian infanojn kaj plorante antaŭ li genufleksis pardonpetante, li eĉ pli multe incitite ekkriis:

„Disfluu en viaj larmoj, kaj viaj malbenitaj infanoj dronu en ili, ĉar nek vi estas mia filino, nek la infanoj miaj nepoj.“

Kaj ĉio plenumiĝis laŭ la patra malbeno. Kampoj, arbaroj, palaco, brutaro kaj ĉio cetera ŝtoniĝis. La princo vestite kiel monaĥo estis forkuranta, sed dumvoje li ŝanĝiĝis je roko, kiu ankoraŭ nuntempe nomiĝas „Mnich“ (monaĥo). La princino ploradis, alvokis sorĉistinojn, sed eĉ ili povis nenion fari kontraŭ la patra malbeno, sed ĉu el ili ŝtelprenis po unu el la infanoj kaj forkuris. Sed ĉie el la tero elkreskis tiom da ŝtonoj, ke la sorĉistinoj mortlacigite pereis dumvoje. Nur la infanoj restis kaj laŭle plorante vokis la patrinon, kiu pleregante alkuris . . . Kaj ŝi ploris, ploradis, ĝis fine el la larmoj fariĝis lagetoj, sep

*) Lago en Tatra-montaro en Polio.

Kutima bildo: minaretoj

Sur kiuj laŭte kantas hoĝoj¹⁾
Servantaj kiel pl-horioĝoj²⁾
Por turkaj ejoj kaj dometoj.
La sanktaj vortoj de l' Korano
Markitaj super moskepordo,
Kaj vivkoloroj en la hano³⁾
Sur vestoj de la gasta hordo.
Vagante tra la Ras⁴⁾ sovaĝa
Sopiris mi al vivo nova,
Dum la naturo belpejzaĝa
Vigligis min per freŝo blova.

Kvieta estis nokt' Sangaka⁵⁾
Trembrilis stelaj miriadoj,
La Virgulino zodiaka
Silente naĝis post Plejadoj, . . .

Pri la Danubaj riverbuŝoj⁶⁾
Mi revis sonĝojn forpasintajn
Kaj la misteraj ventopuŝoj
Alvokis min trans montojn pintejn.

En paca nokt' — dum ĉiuj dormis —
Animo mia sola ploris
La kapo febra revojn formis,
La kor' premiĝis kaj doloris.

Kaj foje en ĝarden' izola,
Dum veni' kolera furiozis,
Mi febre skribis, tute sola,
Kaj man' rapida ne ripozis
Pelajo de la kap' ardanta
Kaj de la batoj de la koro,
Do tiel mia verso kanta
Elkreskis kiel sanga floro.

Petro Stojan, L.K.
(En Novi Pazar, Jugoslavio.)

¹⁾ hoĝo — muhamedana pastro.
²⁾ hano — turka gastejo.
³⁾ Ras — historia nomo de Sangako.
⁴⁾ Sangak — estinta turka provinco, kies ĉefurbo estas Novi Pazar (Jeni Pazar).
⁵⁾ Danuba delto — patrolando de l' aŭtoro.

Literaturaj manuskriptoj.

Ricevital:

273. Jozefa (Bllicher). 274. La morto de l' reĝo Artur (Lennjison). 275. Pet88-versaĵoj. 276. La vivado de la abeloj (Maerlink). 277. Souchna (Schönberg). 278. Derec ĉiela (Helne). 279. Antefaritaj organismoj? (Kiuza). 280. La scienco de l' amo (Merejkovskij). 281. Kiel mi lernis Esperanton (J. B.). 282. Sijenka Razin (P. K.). 283. El la mondo de l' servotuloj: La kapreolino (Gârleanu). 284. La aŭtuno (K. L.). 285. Kien flugos vi, falketo (K. L.). 286. Matena Nebulo (Bunin). 287. Printempa (V. V.). 288. Pulĉinelo (Ldov). 289. Versaĵoj de Fet (Najtingal' kaj Rozo). 290. La formik-ejo (Engström). 291. Kristnaskflamoj (C. St.). 292. Kristnaska antaŭvespero de kuracisto (L. P.). 293. En la vinberkampoj (M. B.). 294. Vinberrikolto (M. B.). 295. La vinumido (P. B.).

Aperos:

159, 176, 243, 263, 277, 278, 279.

Ne aperos:

161, 162, 163, 274, 276.

Diversaĵoj.

Lingva haoso.

Permesu al mi rakonti unu trallon pri stato de mezaj lernejoj en mia urbo, laŭ lingva vidpunkto. Nur pri unu knabo N. mi raportos. Li estas lernanto en la kvara klaso de liceo; mi lin helpas ĉiutage dum la hejma lecionpreparo. Lia gepatra lingvo estas sudrusa dialekto besarabia, iom alia ol la literatura lingvo rusa, uzata en la liceo kiel lerna lingvo. En tio kuŝas unua malfacilo; kaj ankoraŭ li estas feliĉa kompare je liaj samlingvanaj kamaradoj, kiuj iras alian liceon, kie ili ĉion studas en la rumana, lingvo fremda por ili. Krom ellernado de rusa literatura lingvo, mia knabo devige lernas ankoraŭ 4 lingvojn: franca, germana, rumana, latina. Sed la lingva haoso pligrandiĝas ree en la kateĥismo, lernata en la slavona, lingvo lora malproksima de la rusa.

Finfine, mia knabo tute perdas kapon: ses lingvojn, kiuj intermiksiĝas kun lia gepatra, la sepa! Ĝi estas vere troega, certe danĝera por la spirita disvolvado de l' komatinduleto. Kiam mi estis liceano, en la 1894-1902, oni min ankaŭ ŝarĝis je lingvoj, sed nur je 4 devigaj: franca, helena, latina kaj slavona. Mi entute tiuepoke oferis ĉ. 60% da lernotempo al la lingvoj, sed mia knabo ĝin oferas en plia proporcio, eble ĉ. 80%. Do, oni ŝutas en la kapa de moderna knabo multe da vortoj, lomete da ideoj, sed mal-tro da vivigaj elementoj.

P. E. S.

Usono kaj Internacia Labora Oficejo.

Kunlaborado

por protekto de la sano de laboristoj.

Plezuriga provo de pli kompleta internacia kunlaborado estas la sciligo ĵus ricevita de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj en Ĝenève, ke la Registaro de Usono, dezirante kunlabori je agado celanta precipe la plibonigon de higienaj kondiĉoj kaj la protekton de laboristoj kontraŭ malsano, nomis D-ron M. Dorset Estro de la Bichemia Divizio de la Oficejo sin okupanta je la industrio pri bestoj (Bureau of Animal Industry) ĉe la Departemento de Terkulturo, por kunlabori neoficiale kaj konsile kun la Konsila Komitato pri Karbunkolo starigita de la Internacia Labora Organizaĵo.

La efikeco de tiu ĉi internacia Komitato ankaŭ fortiĝis per la fakto, ke reprezentanto jam estas nomita al ĝi de Germanio, kiu estas membro de la Internacia Labora Organizaĵo de la Ligo de Nacioj. Aliaj ŝtatoj, kiuj sciigis la nomojn de siaj reprezentantoj estas Belgio, Francio, Granda Britio, Hindio, Hispanio, Italio, Japanio, Sudafriko kaj Svedio.

La problemoj de la antaŭforigo de la mortiga malsano karbunkolo inter laboristoj per la desinfekto de lano kaj haro infektitaj de karbunkolaj sporoj estas senĉese studata de la Internacia Labora Oficejo de la Unua Internacia Labora Konferenco en Washington en la jaro 1919. Sekve de diskuto pri la internacia reguligo de desinfekto, la Tria Konferenco en Ĝenève lastan jaron decidis, ke la demando bezonas pluan studon, kaj starigis tiucele Konsilan Komitato konsistantan el reprezentantoj de la ĉefaj produktantaj kaj manufakturantaj landoj, por esplori la problemojn laŭ ĉiuj vidpunktoj kaj prezenti raporton en 1923. La Kavaliro William Middlebrook, Membro de la Brita Parlamento, estas nomita de la Brita Registara Komitato pri la antaŭforigo de karbunkolo, kiu kunsidadis de 1913 ĝis 1918, kaj kiu eltrovis kaj rekomendis la metodojn de desinfekto uzatajn en la Brita Registara desinfektejo en Liverpool. Poste li prezidas la Komitato pri Karbunkolo Desinfekto, kiu konsilas la Britan Ministraron de Internaj Aferoj pri la farado de tiu Desinfektejo.

Oni atendas, ke la Konsila Komitato kunsidos la unuan fojon en Londono dum Decembro.

Intern. Labora Oficejo.

Internacia Plimultiĝo de Okupado. Frapantaj Svisaj Ciferoj.

„La lastaj haveblaj ciferoj rilate al la plimulto da landoj montras, ke la malpliigo de senlaboreco daŭras ankoraŭ.“ Tiel diras la novembra numero de la Internacia Labora Revuo en la ĉi-monata artikolo pri »Okupado kaj Senlaboreco«. „Kvankam tiu ĉi malkresko estas parte dank'al sezona okupado en konstruado kaj terkulturo“ daŭrigas la Revuo, »komparado kun la respondaj ciferoj de antaŭ unu jaro montras pli bonan situacion en multe da landoj. Ŝajnas, ke la plej malgranda pliboniĝo okazis en la Unuigita Regno. La malgrava pliboniĝo, kiu iris progresante en tiu lando depon la komenco de la jaro, ne daŭris laŭ la sama rapideco en aŭgusto. Iom da pliboniĝo okazas en Usono, kaj en Kanado la procento de senlaboreco malaltiĝis al 3,6 en aŭgusto, cifero egala al tiu de antaŭ du jaroj kiam la komerco estis agema.

En Eŭropaj landoj, la lastaj statistikoj senescepte montras pliboniĝon. En Svislando la nombro de senlaboretoj falis al 50 procento de la nombro en februaro 1922, kiam la senlaboreca krizo atingis maksimumon. En Italio klara pliboniĝo okazis je la fino de julio. La lasta cifero ricevita el Belgio, cifero rilata al la fino de julio, estas la plej malalta registrita, de kiam la revuo komencis publikigi statistikojn. En Polujo kaj en Ĉeĥoslovakio senlaboreco konstante malpliĝis de post februaro.“

La »Internacia Labora Revuo« estas publikigata ĉiunonate de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj en Ĝenève. Krom la supraciita artikolo, ĝi regule enhavas artikolojn pri la farado de masiraj kaj laboristaj organizaĵoj, analizadoj de tutmondaj pograndaĵoj kaj pomalgrandaĵoj prezoj, kaj notojn pri elmigrado, industria higieno kaj orientado kaj edukado profesiaj. Ĝi ankaŭ enhavas apartajn artikolojn, kaj la novembra numero entenas unu de Prof. Andréas, ĉe la Universitato de Ateno, pri labora leĝdonado en Grekio, kaj alian de D-ro E. G. Huss, Direktoro Ĝenerala de la Sveda Social-Departemento, pri la batalado kontraŭ senlaboreco en Svedujo.

Internacia Labora Oficejo.

Sana Instruado pri historio.

„Edukista In-ernacio“, kiu grupigas 20 000 progresemajn edukistojn ĉiulandajn, el kiuj estas multaj Esperantistoj, prilaktis en sia lasta kongreso (aŭg. 1922) la gravan demandon pri Historia Instruado, kaj ĵus dissendis per Esperanto cirkulerojn por organizi la Internacian kritikadon de la nun uzataj lernolibroj kaj prepari la verkadon de modela internacia historiolibro.

Kritikado de la historiolibro okazos laŭ jena metodo: La filbrojn oni sendu al komisiono edukista de alla t. n. herede malamika lando. Kritiko okazos laŭgrupe (Ekz.: 1. Francio-Germanio kaj Britio, 2. Aŭstrio kaj Italio, 3. Belgio, Nederlando kaj Hispanio, 4. Balkanaj landoj, ktp. . .)

La internacia historiolibro nun temos pri bonajtoj de la civilizo, ne pri militoj aŭ reĝoj, sed pri gravaj elpensaj kaj bonfarantaj de la tuthomaro. Ĝi konsistos el du partoj:

a) Ĝenerala historio en ĉiu lando proksimume sama: homara evoluo de pratempo ĝis nune por akiro de materiala komforto, intelekta kontentigo kaj socialaj progresoj. Tiu parto estas supernacia.

b) aparta historio en ĉiu lando: etnografio de ĉiu popolo, evoluo de la raso, partopreno en la homara bonfarado, biografioj mallongaj de la famuloj homaramaj kun portretoj. Landokarto kun nacilingvaj nomoj geografaj. Tiu 3-a aŭ 4-paga resumita historio verku mem la indigenoj! Tiu parto estas internacia.

Tian modelan historiolibroton povas entrepreni nur Esperantistoj. Jam de ili estas komencita la laboro! Nur internacilingvo ebligas kunigon de ĉiunaciaj penoj. Nur internacia kunlaboro ebligas kontrolon de la senpartieco historia.

La Esperanto-gazeto „Nova Tempo“ pri popoledukado jam komencis tiun laboregon, kiu postulos kelke da jaroj. Ĝi kompilas laŭ edukiva ordo la materialon pri ĝenerala tuthomara historio. Ĝi kolektas etnografiojn de ĉiu popolo. La internacia historiolibro estas unue eldonita en Esperanto! Ĉiu kunlaborinto ricevos rekompencon la verkon.

Kiu deziras ricevi pli detalan laborplanon, tiu sin turnu al

Marcel Boubou,
helpsekretario de Edukista Internacio
(Esperanto-fako)
96, rue Saint-Marceau, Orléans (Francio).

Mi ankaŭ petas informojn por Edukista Internacio pri salajroskaloj por instruistoj kaj instruistino en ĉiu lando (kromsalajroj kaj kompencoj diversaj) — kaj pri novaj edukmetodoj kaj faritaj spertoj pri Laborlernejo.

Parolejo.

139. Oni korektas.

Nia kara samideano s-o Aug de Marich, provizora direktoro de la Tutmonda Polica Ligo, ĉefredaktoro de „La Policisto“ protestas kontraŭ tio, ke la latvaj Esperantistoj en n-o 111 de ET lin nomas „ĉefo de la Hungara policistoj“, kaj klarigas, ke li estas nur „pensilonita polica ĉefinspektoro“. Ni kore petas pardonon de nia aliranga samideano pro nia nevolita eraro kaj estas kontentaj pri la okazo — spite al lia modesto — refoje atentigi nian senilman landon Esperantujon, kie la suno neniam subiras, pri la meritoj de nia kara samcelano, pri lia senlaca disvastigo de Esperanta „epidemia“, per kiu li kun sia „Policisto“ infektas speciale la policistaron de ĉiuj landoj.

En diversaj landoj jam multaj policistoj, skurgataj de „verda febro“ en Esperanta deliro eĉ artiste deklamas versaĵojn.

Riga, 2. XII. 22.

(Or.)

140. Maldecaj bildoj.

Demando al la redakcio.

En ET n-o 111 mi legis, ke la fama skulptisto Antonio Canova kreis centojn da statuoj. Pri tio mi volas ion demandi vin. Kiel vi enpresigis en via ĝis nun ŝatata gazeto ĝuste la maldecan statuon de Herkuleso? Mi opinias, ke la skulptisto ankaŭ faris pli decajn statuojn. Mi volas rimarki al vi tion, kion ne ŝatas multaj personoj el via legataro, nome la malaprobindajn bildojn. Inter la nederlanda katolikaro estas diskonigata la sekvanta averto: „Ne aĉetu en tiaj butikoj kaj vendejoj, kie estas elmontrataj kaj haveblaj objektoj, kiuj insultas la bonajn morojn.“

Konservu la neŭtralecon de ET rilate al ĉiuj deziroj! ET devas esti ita, ke ĉiu povas legi ĝin; tiam ET trimumos.

(H. B. A. en Hego.)

141. Respondo al 140.

Kara samideano! Ĉar vi destinis vian demandon por la Parolejo, mi volas respondi al vi samloke. Supozeble la afero interesas ankaŭ aliajn legantojn. Anstataŭ longajn argumentojn, mi rakontu al vi epizodon el mia propra vivo:

Estante knabo eble 15-jara, mi foje vizitis pastron por konfesi al li. Interalie mi diris, ke mi legis malbonajn kaj rigardis maldecajn bildojn. Je lia demando mi klarigis, ke la libroj estis revoluciemaj kaj la bildoj aritmetikaj de nudaj statuoj. Lia respondo estis, ke revoluciemaj libroj estas malpermesataj nudaj, se ili kontraŭas la religion, kaj ke la rigardo al artaj nudaj statuoj aŭ eĉ korpoj, resp. al iliaj reproduktaj, estas peko nur, se oni ilin rigardas laŭ malĉasta maniero. La nudo neniam estas peko per si mem (la hundoj, bovoj kaj aliaj bestoj ja ankaŭ ne portas vestojn). Neniel nudo incitas ĉastan, puraniman homon; nur malĉastulo vidas en ĝi incitilo por malnobla kupido.

Vi demandas, kial ET ĝuste publikigis la statuon de Herkuleso? Ĉar ĝi estas unu el la ĉefe admirataj verkoj de la granda majstro. Ke eĉ la papo trovis nenion maldecan en lia arto, montras la fakto, ke li donis al la arto la dukan titolon. Kaj ke Canova mem estis bona katoliko, pravas la preĝejo, kiun li starigis en sia naskiĝa vilaĝo.

ET estu neŭtrala! Jes, nepre. Sed iom da larĝanimo ĝi tamen devas peti de aliaj legantoj. Ni ja estas Esperantistoj, kiuj la mondon rigardas de pli alta nivelo. Ni

evitu fariĝi miopaj okulvitruoloj. Nia pli alta percepto pri mondkiato kaj vivkialo ja estas tio, kio nin levas super la altajn homojn, kio nin plenigas per speciale nobelaj sentoj kaj aspirilo, kio donas al nia vivado speciale ĝoigan, feliĉigan enhavon. Tiun altan percepton, tiun benorican larĝanlamecon ni restigu kaj flegu inter ni Esperantistoj kaj provu transplanti ĝin ankaŭ al aliaj homoj.

Cetere, mi estas ĉiam dankema al legantoj de ET pro atentigo pri efektivaĵoj aŭ imagataj nebonaĵoj aŭ nedecajtoj de la jurnalo, por ke mi povu forigi resp. klarigi ilin. Nenio en la mondo ja estas perfekta, kaj se iu pretendus, ke ET estas perfekta, mi nomus lin flatuolo.

(T. J.)

142. Ne nur literaturo.

(Respondo al 137.)

Tute prave D-ro B. Migliorini rezonas, ke ni bezonas ne nur literaturon, sed ke estas pli valore eldoni verkojn pri tekniko, historio, filozofio ktp. Tamen, literaturaĵoj trovas jam hodiaŭ sufiĉe da aĉetantoj, sed aliaj verkoj interesas nur malmultajn Esperantistojn; pro tio la eldono de tiaj verkoj estas ne malgranda risko jam antaŭ la milito mi havis projekton eldoni kolekton de diversspecaj verkoj, similan al la germana „Miniatur-Bibliothek“. Mia tiamano plano estis la eldono de ĉiusemajnaj abone'aj katejetoj po 16 paĝoj pri plej diversaj temoj. Ĉiu katejeto enhavu unu kompletan artikolon: por iom longa artikolo estu rezervataj 2-4 katejetoj. Eble ni povos en venonta jaro ekutiligi la malnovan projekton, se troviĝos ĉ. mil interesuloj, kiuj abonos la kolekton.

En sia Parolo s-o M. aludas pri mia agemo. Efektive, mia agemo estas vigla; sed antaŭ ol entrepreni ion novan, ni (t. e. mia frato kaj mi) devos pligrandigi la preselon. Se la samideanoj aĉus, per kiu' malgrandaĵoj kaj neperfektaĵoj rimedoj ni kreas relative grandajn, ili certe mirigus. Mankas taŭgaj kontoroj, mankas manŝinoj, mankas preslitoj, mankas tempo kaj kapitalo. Ĉiu profito el ET ni ja uzas konstante por pliperfektiĝi nian teknikajn rimedojn, sed la profito el ET sola ne sufiĉas por plene konformigi la teknikajn rimedojn al la daŭre kreskanta bezono. Pro tio ni bezonas pruntojn. Donu al ni kapitalon por pliperfektiĝi nian teknikajn rimedojn. kaj mi promesas, ke ni streĉos niajn tutejn fortojn por pli umi vian deziron!

(T. J.)

Leterkesto de ET.

F. U. en Bürgstein. — Kial vi ne pagas en via valuto? Laŭ nuna kurzo la sendita sumo sufiĉas por 7 numeroj, kiujn ni enskribas en vian abonkonton, kiu finiĝis per numero 114.

M. T. Z. en Belgrad. — Bonvolu pluajn ekzemplerojn aĉeti ĉe nia abonejo en Z.

Z. St. en Košice. — Por sendita mono ni sendis al vi numerojn de ET, pri la aliaj gazetoj bonvolu turni vin al iliaj administracioj.

F. A. Sch. en Wien. — Kvitanco pri ricevita abonmono vi havu en ricevitalo numeroj.

F. Str. en Klado kaj aliaj. — La simpla adreso de la komitato de la XV-a etofo: „Esperanto, Nürnberg“. Neniu alia vorto estas necesa. — La abono al s-o Kr. estas komencita ĉe n-o 111. Ni esperu ke aliaj sekvu.

M. B. en Suceava. — Pri la kotizo por la XV-a bonvolu turni vin senpere al „Esperanto Nürnberg“.



La estraro de „Zamenhofa Esp. Societo“, en Bialystok. Sidas (de maldekstre dekstren): J. Sapiro (prezidanto), L. Agourine (gasto el Francujo), P. Kurjanaki (sekretario), aliaj: S. Liberman, S. Kaplan, R. Platsek.

Recenzojo.

LIBROJ.

PETER SCHLEMIHL. De Adelbert de Chamisso. El la germana originalo tradukis Eugen Wüster. 82-paĝa, bele kartonita. La aktualan prezon demandu ĉe la eldonejo Hirt & Sohn, Esperanto-fako, Leipzig.

Nun la mirinda historio de Petro Schlemihl, la „viro sen ombro“, kiu jam estas tradukita en preskaŭ ĉiuj kulturlingvoj, aperis ankaŭ en Esperanto. S-o Wüster acilas traduki ĝin en bona, flua kaj facile komprenebla stilo. Kelkfoje la traduko estas tro laŭvorta. Novaj vortoj resp. fornoj estas: pansil, angoro, hororo, ingenia, homaĝio, rambo, fugi, l'o, povintus. Kelkaj prezeraroj eneas: la (anst. al), survoŝis (anst. aŭroŝis), vivo las (anst. vi volas), k. a. Ridiga vorto-dlaigo: sek-reton. La unua linio sur paĝo 55 ne estas komprenebla.

Kvankam bone konate la originalon, mi legis la tradukon kun plezuro kaj rekomendas ĝin al la tutmonda samideanaro.

(T. J.)

LA NIGRA GALERO. De Wilhelm Raabe. El la germana originalo tradukis Fritz Wicke. 2-a korektita eldono. 64 pĝ. karton. Aktualan prezon demandu ĉe la eldonejo Hirt & Sohn, Esp. fako, Leipzig.

La rakonto gvidas nin en tempon plenan de heroo batalado kaj romantikaj aventuroj. La agado estas vigla kaj interesa. Bona traduko, flua stilo, gramatika korekto (escepte kelkaj prezeraroj) kaj bela aranĝo certe gajnos al la verko multe da nova amikoj. Precipe por komencantoj ĝi estas rekomendinda.

(T. J.)

GAZETOJ.

Litova Stelo, sept.-okt.
The British Esperantist, nov.
Nordalbinger Esperanto-Mitte-lungen, sept.-okt.
Teristo, sept.-okt.
Skandinava Esperantisto, okt.
Esperanta Finnlando, okt.
Konkordo, jul.-sept., okt., nov.
Brazilia Esperantisto, jul.-sept.
Arguso, okt.
Espero Teozofia, sep.-okt.
La Interligilo de l' P. T. T., nov.
Esperanto (LIEA), nov.
La Suda Kruco, okt.
Holanda Esperantisto, n-oj 44, 46, 47.
Orange-Poste, interesa kaj serioza organo trilingva (Esp., franca kaj germana), oficiala organo de la porinterŝanga kaj porkorespanda internacia klubo „Batavo“ en Scheveningen.

